



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 4-an de Decembro 2023

Ĉeestantoj (*zome, pro la milita stato*): Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Inbar Mor, Amri Wandel, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi.

*Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

### 1. Raportoj

a) **Jehoŝua**: mi renkontiĝis kun Eliezer Drezner, la nevo de Naĥum Drezner – iam fama aktivulo de ELI. Li donis dekon da interesaj fotoj E-rilataj, parte ankoraŭ el la Brita Mandato – palestinaj kaj Universalaj Kongresoj, kaj krome ankaŭ kanto-broŝuron, kiu akompanis la kasedon “Israelo Kantas”, kun dediĉo al la kantistino Ilanit, nevino de Naĥum.

b) **Amri**: mi produktis ĝin en la okdekaj jaroj; la broŝuron dediĉis al ŝi, dum renkontiĝo kun ŝia onklo post publika koncerto en Modiin. Eble, ni provu denove inviti ŝin kanti sian kanton el la kasedo en unu el niaj eventoj (siatempo ŝia agento postulis por tio tro multe da mono).

c) **Amri**: en *Kontakto* (2023/03) tre baldaŭ aperos mia longa artikolo pri la milito kun Ĥamas – el la israela vidpunkto. Kelkaj el ni jam vidis la adaptitan version en la venonta numero de IE. La versio en *Kontakto* estas iom modifiita kaj havas alian foton.

ĉ) **Amri**: Erez el la Administrejo de la Alon-Turo avizis, ke la kontrakto kun ELI (luo de nia oficejo kontraŭ ne-pago de la monata kotizo de ĉ. 1,255 NIS) ĉesiĝos jarfine. [vidu punkton 5!]

### 2. Zamenhofa Vespero (Jehoŝua)

Ĝi estos lunde, la 18-an de Decembro, je la 17h45; la programo komenciĝos je la 18h00. Ankoraŭ ne estas decidite, ĉu ĝi okazos hibride en la Alon-Turo II, ĉu nur zome. **Jehoŝua** serĉas pliajn volontulojn por la arta parto. Ĉu **Inbar** volontulos kanti *duan* kanton, ankaŭ en E-o? Ŝi pripensos, elektos el Jutubo. **Luiza** proponis laŭtlegi unu el siaj rakontoj. Ŝi bezonas dividon de sia ekrano – **Amri** proponas ekzerci tion kun ŝi antaŭ la evento (eble **Jehoŝua** laŭtlegos ĝin anstataŭe). **Amri** proponas, ke **Mikaelo** prezentu la novan IE (176) sur la ekrano, dum 10 minutoj. **Mikaelo** konsentas, sed preferas, ke Amri dividu sian ekranon, kaj petas minimume 20 minutojn. **Ŝlomo** prezentos la buĝeton, pri kiu oni voĉdonu. Krome, la Ĝenerala Kunveno devos elekti (por du jaroj) novan Estraron kaj Kontrol-Komisionon.

### 3. Israela Esperantisto

a) **Jehoŝua** trakribis la adresaron. Estas ĉ. 100 israelanoj – tiuj, kiuj ne pagis pli ol 3 jarojn, ricevos avizon. Da eksterlandanoj estas 100 – nun restos 72, el ili 34 individuoj, la aliaj – institucioj. **Amri** bezonas 10 pliajn por reklamado/disdonado en la jarfina kunveno en Germanio. Entute estos presotaj ĉ. 200 (la preciza nombro decidota post kiam Jehoŝua fintraktos la israelajn adresojn), liverotaj far la presejo al **Mikaelo**, krom tiuj 10, kiuj estos sendotaj rekte al **Amri**.

2/...



b) **Mikaelo** enkovertigos la revuojn (aldonante la avizon), sendos la tuton per taksio al **Jehoŝua**, kiu enpoŝtigos ilin, jam kun la antaŭa sperto. **Jehoŝua** esploru ĉe la taksi-kompanio pri mendo kaj ebleco pagi post la livero. **Ŝlomo** ankoraŭ devas pagi 45 NIS (por la antaŭa transportado) al **Mikaelo**, kiu subskribos peton preparotan de **Ŝlomo**.

#### 4. La Israela Kongreso – Aprilo 2024 (Jehoŝua)

**Jehoŝua**: la serĉado en la sudo – malsukcesis. De *Jerusalem Hostel* mi petis 15 dultajn ĉambrojn telefone kaj poste skribe – sed tiam ne estis reago. Plia telefonvoko evidentigis, ke ne estas sufiĉaj ĉambroj. Nova prez-peto ne estis reagita. **Amri** sukcesis kapti telefone la direktorinon Osnat (kiu memoris lin de la Postkongreso en Aprilo) – ŝi ne vidis iun rezervon de ELI, sed diris, ke momente restis nur 4 ĉambroj kun 13 litoj por tiuj datoj. Estas du grupoj, kiuj jam rezervis por la sama tempo, sed unu faris tion el Usono antaŭ la milito, kaj eble ili rezignos. La direktorino promesis al **Amri** esplori pri la usona grupo, kaj informi – sed ankoraŭ ne alvenis reago de la grupo. **Amri** tuj rezervis la 4 ĉambrojn, kaj proponas mendi aldonajn ĉambrojn ĉe la proksima junulargastejo *Agron*, distance de kelkminuta piedirado, eventuale ankaŭ en la junulargastejo *Rabin* kaj aliaj malmutekostaj hoteloj. **Jehoŝua**: Tio ne estas bona ideo – multaj rezignos veni al la centra kunven-salono, krome – forestas publika transporto semajnfine. **Eran**: en la nuna situacio ni ne povas dorlotiĝi, postulante ke ĉiuj troviĝu en la sama hotelo. **Amri**: ankaŭ en la UK kaj aliaj kunvenoj (ekzemple la NR en Germanio) kongresanoj loĝas en pluraj lokoj. Se ni devas elekti inter ne-okazigo de la IK kaj okazigo en iom malpli komfortaj kondiĉoj por parto de la kongresanoj, mi pensas ke la dua ebleco estas klare preferinda. **Jehoŝua** provis trovi 15 ĉambrojn en samprezaj lokoj en Jerusalemo per *Booking.com* – estis nur en la Orienta Jerusalemo. En Tel-Aviv li trovis per *Booking* du eblecojn en similaj prez-kadroj kaj en la samaj datoj, kun matenmanĝo: *Hotel Josef* en Jafo, kaj *Selina* en strato *Hajarkon*. Ne trovinte telefonnumerojn li devos veturi tien por esplori, kaj se iu taŭgas – tuj kontrakti. **Decido**: daŭrigi la provojn, sed atendi la venontan kunsidon (la 8-an de Januaro por pli da detaloj – kaj tiam decidi, ĉu la Kongreso okazos aŭ ne, kaj kie.

#### 5. La oficejo

Kiel supre raportite de Amri, baldaŭ ĉesiĝos la lu-aranĝo kun la administrantoj, kaj ni devos pagi ĉ. 1,255 siklojn monate, aŭ eĉ pli. Ni devas klopodi denove luigi – kvankam la ŝanco estas malgranda. **Amri** provos reklami ĝin ĉe *Yad2*, kaj ankaŭ petos la helpon de la etaĝ-administranto pri luigo – kvankam estas multe da vakaj oficejoj en nia etaĝo. **Voĉdono**: *akceptita*.

**La venonta kunsido**: lunde, la 8-an de Januaro 2024, je 20:00

*Protokolis: Gabi Zeevi*